99

„Mutig vorwärts!“ **Aŭstria Esperantisto** „Kuraĝe antaŭen“

Aŭstria Esperantisto

(Österreichischer Esperantist)

Oficiala organo de Int. Esperanto-Muzeo kaj Aŭstria Esperanto-Asocio

10a jaro. N-ro 12 Monata Decembro 1933

Redaktejo kaj Administrejo: Wien, I., Neue Burg (Tel. R 27-803).

Konto bei der Postsparkasse D-123.826

Jarabono (komencebla ĉiumonate): Por aŭstrianoj aŭ S 3.90, germanlandanoj RM 2.75 alilandanoj sv. fr. 3.50; ponumere: por enlandanoj 35 aŭ. g., eksterl. 45 aŭ. g.

Nicht zeitgerechte Abbestellung unseres Organs verpflichtet zum Weiterbezug.

„Der Gebrauch des Esperanto als Hilfssprache, um die internationalen wissenschaftlichen Verbindungen zu erleichtern.“

Unter diesem Titel erschien im »Bulletin géodésique« Nr. 10 aus 1926 (wir erhielten dasselbe soeben von Hofrat Dr. Schumann, Professor an der Technischen Hochschule in Wien), Paris, ein Artikel, der eine Reihe von wissenschaftlichen Veröffentlichungen aufzählt, die in »Gerlands Beiträge zur Geophysik«, Band 15 in deutscher Sprache mit einem Resümé in Esperanto erschienen.

Esperanto-Radio-Auslandsdienst:

20. Dez. Reg. Rat Steiner „Internationale Konferenz Wien, 1934“ in deutscher Sprache und Esperanto

27 Dez. Marie Fiedler „Wien, die Stadt der Musik“ (Fremden-Verkehrskommission für Wien)

3. Jänner. Reg. Rat Stengel „Auf zum Wintersport nach Salzburg“

10. Jänner. Nikolaus Hovorka „Moderne österreichische Dichter“

17. Jänner. Reg. Rat Steiner „Winterfreuden in Niederösterreich“ (Fremdenverkehrsamt für Niederösterreich).

Immer ungefähr zwischen 21—22 Uhr.

Die Aufgaben der Hilfssprache Esperanto im neuen Deutschland.

A. 1. Sie soll die Wahrheit über Deutschland ins Ausland tragen.

2. Sie soll die Darlegung der deutschen Belange in weitem Masse ermöglichen.

3. Sie soll die deutschen Minderheiten im Ausland vom Druck der fremden Sprache befreien.

4. Sie soll die Vorherrschaft der englischen und französischen usw. Sprache als Weltsprache brechen.

B. 1. Sie muss dem Austausch der Wissenschaft und ihrer Forschungsergebnisse dienen.

2. Sie muss der deutschen Wissenschaft und dem deutschen Kulturgute höchste Weltachtung verschaffen.

3. Sie muss den Fremdenverkehr (Reiseverkehr) fördern und den Handesverkehr heben.

4. Sie muss dem deutschen Rundfunk die Möglichkeit geben, über die Grenzen hinweg für Deutschland zu werben.

C. 1. Sie wird auch den Kindern, die nicht höhere Schulen besuchen können, die Möglichkeit geben, sich fremdsprachige Bildung anzueignen.

2. Sie wird lehren, die Muttersprache recht zu verstehen, zu üben und zu lieben,

3. Sie wird zu logischem Denken und zu klarem Ausdruck in der Sprache erziehen.

4. Sie wird die Zersetzung der deutschen Sprache durch Fremdwörter bekämpfen.

D. Sie befreit die Schüler höherer Schulen von fremdsprachiger Ueberlastung und schafft somit Zeit für körperliche Ertüchtigung.

E. Sie dient der deutschen christlichen Kirche in der Erfüllung ihrer Missionsaufgaben. (Aus »Deutscher Esperantist«-Berlin)

Esperanto-Klub

Dichterabend am 21. Dezember 1933 um 20 Uhr.

Einleitende Worte in Esperanto: Nikolaus Hovorka „Dichtung und Sprache“ (Exkurs über Stefan George).

Es lesen in deutscher Sprache:

Friedrich Schreyvogel, aus eigenen Werken,
Rudolf List, ein Kapitel aus einem noch unvollendeten Romane.
Ernst Lissauer, aus eigenen Werken,
V. O. Ludwig, aus eigenen Werken,
Rudolf Henz, Lyrik und Prosa,
Heinrich Suso Waldeck, Ernstes und Heiteres.

Int. Esperanto Muzeo en Wien

Wien, I. Neue Burg, Heldenplatz.
Telefono n-ro R 27-803

Malfermata labortage 9—12, 15—18 h; sabate 9—12 h.

Internacia Kuratora Komitato:

Ĉeĥoslovakio:

Dro Stan. Kamaryt, prof., prez. de ĈAE, Bratislava.

Dumvivaj membroj (Aŭstrio S 15.—; alilandaro egalvaloro de svis. fr. 12.50; event. en 3 partpagoj):

534. D-ro Stan. Kamaryt, prof. Bratislava; 535. Univ. prof. d-ro Odo Bujwid, prez. de Pola E.-Del., Honora Membro de IEMW, Krakow. 536. D-ro Benson, School of Esp., Newark, USA.

. . . . 44. Grupo de Dunkerque kaj Malo, Dunkerque, Franc.

Stockholm

invitas vin al la 26-a Univ. Kongreso de E. 4.—11. aŭg. 1934.

Adreso: Fredsgatan 4, Stockholm.

Kotizoj: Ĝis 31. marto 20 sved, Kr. ĝis 1. julio 25 kaj poste 30.

Fervoja rabato en Svedlando 25 %.

Oni vivas malmultekoste en Stockholm nuntempe pro la valutofalo de la sveda krono, egala al 85 svis cent.

Provizora programo:

4. aŭg. Solena malfermo en la koncerta domo, poste interkonatiĝa vespero.

5. aŭg. Diservoj en ĉefaj preĝejo, mallonga ekskurso, vespere koncerto.

6. aŭg. Malfermo de Somera Universitato de rektoro Sam Jansson

Somera Universitato kaj ĉiuj kunsidoj okazos en la **sveda parlamenta domo**.

Unua kunsido de UEA. Fakkunsidoj. Vespere oficiala akcepto de la urba magistrato per solenajo en Blua salono de Urbdomo.

7, aŭg. Somera Universitato. Kunsidoj Vesp. naciaj dancoj kaj speciala programo en la subĉiela muzeo, la belega Skansen.

8. aŭg. Somera Universitato. Kunsidoj. Vesp. teatra prezentado.

9 aŭg. Tuttaga ekskurso al Upsala, Sigtuna ktp. laŭplaĉe. Literatura kabaredo.

10 aŭg. Somera Univ. — Kunsidoj. Vesp. internacia balo en Blua salono de Urbdomo.

11. aŭg Malfermo.

Esperanto kaj Futurismo.

Antaŭ kelkaj monatoj vizitis Pollandon fame konata italo, ekscelenco Francesco Marinetti, kreinto de futurismo, kiu en kelkaj polaj urboj havis interesajn prelegojn.

Vizito de la fama futuristo havis ĉe ni, en Lwow, ankaŭ sian influon je Esperanto. Mi konvinkiĝis pri tio, kiam mi preparadis paroladojn de la negro, s-ano Kola Ayayi. Mi volis lui por publika parolado la saman salonon, en kiu prelegis Marinetti kaj kiu apartenis al konata kultura klubo lvova.

Iutage mi iris al la sekretariejo por demandi pri la kondiĉoj. Akceptis min tre eleganta, juna sekretario, vere tipo de moderna dando. Post eble duonhora interparolado, dum kiu mi havis okazon multe rakonti al la simpatia sekretario ankaŭ pri Esperanto, jam elirante mi ankoraŭ demandis:

Nu sinjoro sekretario kaj kia estas via opinio pri Esp. kaj pri „negra aranĝo"?

„Mia opinio?" — La sekretario, kiu ĝis nun kun saĝa mieno aŭskultadis min, ekmoviĝis maltrankvile kaj post momento respondis: „Vi scics sinjoro — mi ne povas tion diri al vi, ĉar — mi entute ne estas — „futuristo" kaj mi malbone konas futurismon . ."

Senvorte mi manpremis „malplenkapan" (bela esprimo, ĉu ne?) sekretarion kaj mi foriris. (Laŭ „Pola Esperantisto"-Krakow)

Esperanto en sonfilmo.

Por la sonfilmo de skolta mondtendaro oni kaptis i. a. ankaŭ scenon kun esp-istaj skoltoj. Kvankam la tuta sceno nur daŭras kelkajn minutojn sed oni bone vidis unue diversnaciajn skoltojn, kiuj en sia nacia lingvo diras, el kiu lando ili venis al jamboreo, poste P. Balkanyi, reprezentanto de Skolta E-Ligo, diras antaŭ tuta grupo, ke ili ĉiuj komprenas unu la alian per E. Dum liaj vortoj oni disvolvas verdstelan flagon de SEL, kunportitan el Anglujo.

Rezolucio

por vere internacia Esperanto, unuanime akceptita de 21. Japana E-Kongreso, Kioto, 3. nov. 1933.

„21. Japana E-Kongreso atentigas pri la reformemo kaj troa neologismo de „modernaj" esp-istoj, kiuj konstante malfaciligas nian internacian lingvon. Tre ofte oni ne atentas nin orientanojn ĉe enkonduko de „internaciaj vortoj", kiuj ne estas kompreneblaj en la Oriento, same kiel en multaj Eŭropaj landoj

Nia majstro neniam parolis pri E kiel „la Eŭropa lingvo", sed ĉiam kiel la lingvo „de l' tuta Homaro". La Japana esp-istaro konstatas, ke, se la opinio pri E kiel „la Eŭropa lingvo" estus alprenata de la plimulto de niaj Eŭropaj s-anoj, la disvastiĝo de nia lingvo en Oriento estus grave endanĝerata.

Konsiderante tion ni deklaras:

1) La vortfarado per afiksoj kaj kunmetado estas unu el la esencaj karakteroj de E; ĝi estas grava plifaciligo de la lernado,

2) La esenco de la lingvo mem kuŝas en ĝia manifestado, kiu realiĝas ĉefe en la literaturo; konsekvence, fako speciale nomata „literatura" en E ne povas ekzisti kaj oni ne povas formi ian fakan vortaron literaturan kiel ekz. Maŝinfakan ktp. terminaron. Tion ĉi ni asertas spite al la sofismoj de anoj de la tielnomata „literatura fako".

3) Neologismoj pro bezono de poem-

fabrikado estas nenio alia ol la degenerado de la arto poezia; plie, en E ĝi ĝi signifas rekte danĝeran ludon kontraŭ la Fundamento.

Konsiderante, ke ni ekstrem-orientanoj povas fari pli objektivan juĝon pri la internacieco ol la Eŭropanoj, kies lingvoj estas tre proksimaj al E kaj gardi severan senpartiecon kaj neŭtralecon ni, kunvenintaj en Laborkunsidoj de 21. Jap. Kongreso en Kioto, energie malrekomendas pro la bono de nia lingvo la uzon de neologismoj sen nuanca diferenco aŭ kun perforta nuancigo.

Ni vokas al niaj s-anoj en Okcidento: La epoko de Eŭropa kaj kontinenta idea imperiaiismo jam definitive pasis. Vivu la tuthomara solidareco kaj la interkontinenta lingvo E.! Vivu ankaŭ la egaleco de rajtoj de ĉiuj popoloj ankaŭ sur la lingva kampo internacia!

„Receuil des Listes de Logatomes Esperanto pour Mesures de Netteté“, Eldonis Comité Consultatif International des Communications Téléphoniques à Grande Distance, 23 Ave de Messine, Paris.

Jen libro teknika, konsistanta el 15.000 artefaritaj silaboj, presitaj laŭ la E-alfabeto, kiujn oni uzas internacie por provi la telefonian aŭdeblecon de diversaj sonoj kaj sonkombinoj. Tiujn silabojn oni nomas „logatomoj“-n. La libro estas rimarkinda ekzemplo de oficiala uzo de nia alfabeto por internacia skribo fonetika, kaj akompanate de „ŝlosilo“ E-a. por klarigi la alfabeton, uziĝas multlande ĉe telefonrondoj oficialaj. Por laika E-isto la libro estas senutila.

Geedziĝo.

Koran gratulon al ges. **Tyyne Ihamäki** kaj **Hugo Salokannel** en Salminen, Finnlando. Ĉiam kun plezuro mi memoras mian restadon en via bela lando.

Por IEMW kaj AEA: Steiner.

Koran gratulon al **geedzoj Morariu** okaze de enmondiĝinta Dorica-Selma.

IEMW, AEA: Steiner.

Koran kondolencon al nia pioniro

P. Andreo Cseh

pro la morto de lia patrino s-ino Gabriella Cseh-Komsromy de Belényes. kiu mortis en la aĝo de 57 jaroj, kaj de lia patro Otto Felix Cseh, pensiita direktoro de ŝtata grundregistra oficejo, kiu mortis nur kelkajn semajnojn post sia edzino en la aĝo de 71 jaroj.

IEMW, AEA: Steiner

Inoj lernu Esperanton!

Leopoldine Tesar partoprenis antaŭ du jaroj E-kurson en la komerc-lernejo Schremmer. La kursgvidanto reg. kons. Stengel je finiĝo de la kurso peris E-korespondadon pro perfektiĝo. Jen kio okazis? Leopoldine korespondis kun s-ano Miller en Metz kaj antaŭ nelonge fariĝis s-ino Miller. Ni kore gratulas.

Inoj lernu Esperanton!

D-ro Cortezo †

La 24. VIII. mortis en Madrid D-ro Karolo Cortezo y Prieto, 83-jara, unu el la plej eminentaj kaj respektataj kuracistoj de Hispanujo.

Li scipovis plurajn lingvojn kaj ŝatis esplori en latina kaj greka. En la lastaj jaroj li dediĉis sin al E. kiun li flue uzadis, kaj fariĝis unue prez. kaj poste Honora Prezidanto de Hispana E-Asocio.

Pri la valoro de E. li diris: Ricevi per E fratan saluton, estas ja multe: legadi prelegon, faritan en Genève de ĥina profesoro pri la Konfuciaj doktrinoj aŭ legi statistikon pri la esplorado en la Tokia universitato kelkajn tagojn post ĝia publikiĝo, farita de iu profesoro el la nomita universitato, tio estas vere bela, aperinda antaŭ la juĝantaro de la universala civilizacio, kune kun la senfadena telegrafio, la aerveturado kaj la telefona interkomunikiĝo. Tial mi estas kaj estos entuziasma esperantisto; nur tiom mi bedaŭras, ke mi estas tro maljuna por povi ĝisatingi la tutan progresigan puŝon, kiun oni ĉie konstatas kaj kiu baldaŭ sukcesos liveri la plej firman bazon por la tuthoma Paco kaj Prateco.“

Pastro I. G. Ŝirjaev †

Pastro-dekano Johano Genadieviĉ Ŝirjaev, la aŭtoro de „Enciklopedio de Esperanto“, mortis la 23. okt. 1933.

Li naskiĝis la 11. IV. 1877 en vilaĝo Vereteja, gub. Jaroslavl, kiel filo de diakono. Depost 1895 li seninterrompe laboris por E.

Li partoprenis literaturajn konkursojn de Franca Societo por Propagando de Esp. (L. de Beaufront) en 1910 (granda bronza medalo, kaj poste ĉiam kun granda sukceso tiujn de „La ondo de Esperanto“, de „Internaciaj Floraj Ludoj en Katalunujo“, Hispana E.-Asocio kaj Brita Esp.-Asocio. Li kunlaboris en multaj gazetoj. 1900 oni eldonis en Paris liajn naivajn junulajn originalojn „Sep rakontoj“ sub pseŭdonimo“ „Ivan Malfeliĉulo“, kiuj poste havis duan eldonon kaj estis presitaj en braila skribo. Sed multaj liaj verkoj, originalaj kaj tradukaj, ripozas kiel manuskriptoj en siaj tirkestoj. Lastatempe li finpreparis „Enciklopedion“, kiu per 2000 alfabete ordigite artikoloj ĉiuflanke kaptas la E-movadon de ĝia komenco ĝis nun. Nun Literatura Mondo eldonos ĉi tiun verkon.

Li ripozu dolĉe!

En la paroĥa preĝejo de Lomigory, s-ano pastro K. M. Kolobaŝkin, okazigis en Esp. funebran diservon (liturgion de S-ta Johano Orbuŝulo) laŭ la traduko de l'mortinto. La ĥoro sub gvidado de monaĥino Pavliŝĉeva kantis en E ĉiujn liturgiajn preĝkantojn. La diservo daŭris 2 horojn kaj estis denove okazigita la 11. XI. kaj 1. XII.

Anekdotoj.

Brahms estis pasia fumanto. Kiam juna artentuziasto pro respektego ne volis fumi la egiptan cigaredon kun ora beko, kiun la majstro donis al li, sed prefere deziris gardi ĝin kiel memoraĵon. Brahms ridante diris: „Kio? Gardi ĝin? Nu, tuj redonu la bonan cigaredon. Por tiu celo „Sport" ankaŭ sufiĉas.

Schikaneder, kiu skribis la tekston por „Zauberflöte" (Sorĉfluto) de Mozart, estis tre talenta aktoro, muzikisto, kantisto, teatra direktoro kaj poeto. Kiam la 30-an de sept. 1791 okazis la unua prezentado de Zauberflöte sur lia scenejo, oni ankaŭ gratulis al Schikaneder pro la granda sukceso de tiu muzika majstroverko. „Bone, bone", diris la libretisto, „la opera plaĉis, sed kiom da aplaŭdego ĝi eĉ estus trovinta, se tiu Mozart ne estus fuŝinta tiom!"

Juna muzikemulo iam demandis **Mozart**: „Diru al mi, kiamaniere oni fariĝas komponisto."

Mozart: „Por kompreni ton, vi estas ankoraŭ tro juna."

Muzikemulo: „Sed vi ja eĉ estis pli juna, kiam vi komencis komponi."

Mozart: „Tio estas veraĵo, sed same, ke mi bezonis neniun demandi, kiamaniere oni devas konduti tiucele."

Profesoro **Virchov** estis severega ekzamenanto. Iam, doninte ekzaktan priskribon de iu malsano li demandis kandidaton, kiun kuracilon tiu donus. Oni nomis la ĝustan. „Bone, kaj kiom?" — „Manĝokuleron da ĝi, profesora moŝto."

Poste la ekzamena komisiono iris en la apudan ĉambron por interkonsiliĝi. Post kelkaj momentoj la kandidato memoris, ke la nomita kvanto estis multe tro granda. Ekscitite li rapidis en la interkonsiliĝan ĉambron. „Profesora moŝto", li diris, „mi erarparolis. Mi nur donu kvin gutojn".

„Mi tion bedaŭras", estis la mallonga respondo, „sed la paciento jam estas mortinta".

Alian kandidaton **Virchov** demandis: „Kion vi povas rakonti pri la funkcio de la lieno?" — „La lieno — mi — profesora moŝto", la demandito balbutis. „Ĉi-momente mi ne povas memori ĝin, sed hieraŭ mi ĝin certe tute precize sciis " — „Kia domaĝo!" Virchov sarkasme opiniesprimis, „Vi estas la unua ĝis nun, solvinto de tiu problemo kaj ĝuste vi devis ree forgesi ĝin."

En aŭtuno 1916 oni rakontis en Orienta Prusujo jenan anektoton. Antaŭ nelonge la rusa caro sendis al la germana imperiestro dek buŝelojn da aveno, samtempe akcentante, ke li havis tiom da soldatoj, kiom la avenaro havis da greneroj. Al tio la imperiestro respondis jenmaniere: „Mi havas blankĉevalon en mia stalo, kies nomo estas Hindenburg, ĝi formanĝis ĉiun avenon. Sendu plian, kara kuzo!"

Laŭ „Ich spreche Englich", Tagbl. Bibl.-Wien, trad. dro Biehler.

La bedaŭranta edzo.

De Jan van Schoor.

Vi fraŭloj feliĉaj, aŭskultu
konsilon de sperta vir'
de ĉiu knabin' edziniĝi
la sola estas dezir'.
Evitu.ŝiajn kaptilojn,
ne fidu pri iu virin'!
Mi malfeliĉulo edziĝis,
sed ve . . . mi bedaŭras ĝin!

Dum nia gefianĉiĝo
ŝi estis kvazaŭ anĝel':
ha! kiom da belaj promesoj!
ha! kia estonta ĉiel'!
Sed iam edziniĝinta,
ŝi iĝis diktatorin'!
Mi, malfeliĉulo, edziĝis,
sed ve . . . mi bedaŭras ĝin!

Mi devas ordigi la hejmon
post mia ofica labor',
mi devas varti l' infanojn,
plorantaj ofte en hor'!
Kaj tio dum ŝi trankvile
klaĉadas kun najbarin'!
Mi, malfeliĉulo, edziĝis
sed ve . . . mi bedaŭras ĝin!

Nur dum la ĉiusemajna
Esperantistara kunven'
ĉe glaso da bruna biero,
foriĝas mia ĉagren'.
Sed kiam mi hejmen revenas,
bastono atendas min!
Mi, malfeliĉulo, edziĝis,
sed ve . . . mi bedaŭras ĝin!

Post tiu ĉi tera vivado,
jen mia tutsola esper'! —
mi iros al la ĉielo
ŝi certe al la infer'!
Mi tiam feliĉa estos,
dum brulos la diablin'
Mi, malfeliĉulo, edziĝis,
sed ve . . . mi bedaŭras ĝin!

(El »Belga Esperantisto«)

„Le Philatelis'e Esperantiste", dumonata bulteno, 30 rue du Chemin Vert, Drancy (Seine), Franc. ekaperis en novembro 1931.

Bulteno de Amerika E.-Instituto, kvaronjara, ekaperis en oktobro. 4. paĝa.

„Reformludkartoj", elpensinto nia s-ano Karl Siegfried Pirchan, Wien, 9. Währinger Gürtel 116. Interese estas, ke estas enkondukita anstataŭ „Kruco„-koloro la Esp.-verdkoloro.

Propagandilo por „Ortho-Brom-arĝento-papero por kontaktpreso kaj pligrandigo" aperis en 17 lingvoj sur 1 foliego, inter ili en Esp.

Kristnaska festo de la kat esp.-istoj la 20. dec. en teretaĝa salonego de Schottenstift, Wien, I. Freyung 6 (Enirejo apud la apoteko). **Venu multnombre!**

Aŭstria Esperanto-Asocio
Wien I Neue Burg, Heldenplatz

La „Ŝtatan ekzamenon" pasis: a) kapableco: **Haselbauer** Oswald, Braunau, kun distingo kaj **Zuber** Thomas, Knittelfeld; b) instru-kapableco: instr. **Schnell** Hermann kun distingo.

Volksabstimmung.

Wir geben die erste Serie Anmeldungen der Samideanoj, die bereits geantwortet haben, und bitten alle unsere Abonnenten um ihre Antwort!

Die Gruppen werden gebeten, die Listen an uns einzusenden, unter Anführung, welcher Kategorie ihre Mitglieder angehören wollen.

Weisungen an die Gruppen bezüglich Abführ des Geldes und Verrechnung gehen ihnen in den nächsten Tagen zu. Die Einzelmitglieder werden nach ihrer Anmeldung über die Art der Einzahlung verständigt werden.

Die Zahlungen können monatlich, aber auch viertel-, halb- oder ganzjährig im Vorhinein geleistet werden.

Da manche Samideanoj wirklich nicht in der Lage sind, 70 g monatlich zu zahlen, so wurde noch eine Kategorie (ohne Aŭstria Esperantisto) geschaffen, um auch diesen die Möglichkeit zu geben, in unserer Zentralorganisation (UEA-Genf) Mitglied zu sein und die Dienste dieser Organisation in Anspruch zu nehmen. Nichtmitglieder haben keinen Anspruch auf diese Dienste und wird dies den Delegierten in aller Welt von der UEA neuerdings in Erinnerung gebracht werden.

Nur so organisierte Mitglieder haben nach den Bestimmungen des Kölner Uebereinkommens, nach dem sich selbstverständlich auch unsere Landesorganisation zu richten hat, das Recht der Mitbestimmung bei Wahlen, Abstimmungen usw. und auch der Inanspruchnahme der Delegierten.

Mitgliedsbeiträge:

Wer sich nicht seiner Pflicht dem Esp. gegenüber entziehen will, hätte zu zahlen
a) **monatlich 70 g** (dafür ist er Mitglied der UEA-Genf, AEA-Wien, irgend einer Gruppe nach seiner Wahl und erhält „Aŭstria Esperantisto"; zahlt nicht mehr als jetzt);
b) **monatlich 30 g** Familienmitglieder (so wie vorher, nur ohne Zeitung AE);
c) **monatlich 40 g** Arbeitslose (dasselbe wie unter 70 g, also mit Zeitung!);
d) **monatlich 100 g**, wer auch das Jahrbuch UEA-Genf beziehen will. (sonst wie 70 g);
e) **monatlich 155 g**, (wer außerdem die Zeitung „Esperanto-Genf" beziehen will).
f) **monatlich 40 g** (Mitglied der UEA-Genf, AEA-Wien und irgendeiner Gruppe nach seiner Wahl; **ohne AE!**).

Wollen Sie noch vor Ende des Jahres antworten!

Im Uebrigen bleiben alle Punkte in den Nummern 10 und 11 aufrecht.

AEA: Steiner.

La alvoko al la E-isto popolo en Aŭstrio rezultiĝis ĝis nun, ke jenaj personoj deziras esti organizitaj en la kadro de UEA kaj AEA;

1. listo.

1. Gust Weber (KUE), 2. Marie Weber (KUE), 3. Rudolf Hoschek (E-Klubo), **4.** Irene Rusch (KUE), 5. Inĝ. Blauhut (Klub), 6. Dr. H. Maier (Klub), 7. Paroĥestro Heinr. Bernauer (Klub) ĉiuj Wien; 8. Marie Pölzl, Lang-Enzersdorf (Klub); 9. Episkopo Robert Tüchler (Klub); **10.** fervojofic. Fr. Holey (Klub); **11.** Hans Haschok (Klub); 12. fakinstr. Jos. Hummel (Klub); 13. Marie Schihavy (Klub); 14. Olly Wieninger (Klub); 15. Adolfine Navratil (Klub); 16. fakinstr. Helene Drewenschegg (Klub); 17. bankofic. Rob. Farthofer (Klub); 18. Rosa Farthofer (Klub); 19. Hermine Frost (Klub); 20. bankofic. Emma Zegner (Kl); 21. Mizzi Beck (Kl); 22. Karl Trautenberger (Kl); 23. Wilhelmine Havlas (Kl); 24. reg. kons. Hugo Steiner (Kl); 25. Viktor Huschka (Kl); 26. Karl Siegfr. Pirchan (Kl); 27. Dr. A. Engländer (Kl); 28. Karl Krauss (Kl); 29. Marie Fiedler (Kl); **30.** Ludw. Kaff (Kl); 31. Dr. Emil Pfeffer (Danubio); **32.** Ella Pfeffer-Rudner (Dan.); 33. Fr. Pöllinger (Kl); 34. Fr. Kraus (Kl); **35.** Kurt Korinek (Kl); 36. E. G. Bernfeld (Harmonio); **37.** kortega kons. Wilh. Heeber (Dan. k. Kl); **38.** Felicitas Basler (Dan. k. Kl); 39. Nikolao Hovorka (. . . . . kaj Kl); **40.** Käthe Mohr (Kl); **41.** Jos. Aitzinger (Zamenhof); 42. Leopoldine Biberle (Kalocsay); 43/44. Josef kaj Hanne Konkurewics (Kl); 45/46. Ludw. kaj Christine Siedl (KUE k. Kl); 47. Amtsrat Carl Gasperini (Dan.); 48. And. Deistler (Dan.); 49. Walter Mudrak (KUE k. Kl); 50. lernejdir. Victorine Hand (Kl); 51. Jul. Fellerer, fervojofic. (Kl); 52. Käthe Strassgütl (Kl); 53. Stef. Eder (Sós); 54. lernejkons. Raim. Spinka; 55. S-ro Basler (Kl) ĉiuj Wien; 56. Rud. von Lidl, Salzburg; 57. Fritz Stegmüller, prez., Salzburg; 58. prof. Dr. Fr. Christanell, Salzburg; 59. dir. Karl Wannek, Linz; 60. Josef Mraz, Linz; 61. Ant. Wagnleitner, Wels; 62. Mag. Alex. Taussig (Sós k. Kl); 63. Ria Steiner (Kl); 64. Louis Fucik, Wien; 65. lernejkons. Fr. Schöpfer, Voitsberg (E-Graz); 66. Ant. Langer, Unt. Retzbach (Kl); 67. Heinr. Probst, Steyr; 68. Fr. Dvorak, Wien (Dan.); 69. ĝendarminsp. Heinr. Kaiper, Gloggnitz; 70. lernejestro Fr. Brückl, Streifing; 71. lernejestro Jos. Faderbauer, Obersulz (Kl); 72. Lokomotivestro Al. Hilkersberger, Zams, Tirol (KUE); 73. Fr. Höllerer, Kirchberg a. Wagram. 74. 75. Alfred kaj Karoline Kaff (Kl); 76. Marie Biehringer (Kl); 77. Joh. Reder. (Kl); 78. Heinr. Kraft (Zamenhof) ĉiuj Wien; 79. Herbert Streif Graz (AEA); 80. Franz Abel, **Kilb; 81. Franz Stanke, Krems; 82. Ernst**

Werner; 83. kalk. kons. R. M. Frey (Kl); 84. reg. kons. Fritz Stengel (Kl ; 85. Rud. Kozeschnik (Kl); 86, 87. Herbert kaj Leop Kail (Zwach); 88. Maria Otruba (Zwach); 89. Wilh. Hinterdorfer (Zwach); 90. Karl Eggenhofer (Zwach); 91. Grete Schuller (Zwach); 92. Otto Bergdold (Zwach); 93. Hans Aitzinger (prez. de Zamenhof); 94. Al. Fink, impost - kontrolofic. Tamsweg (Gr. Salzburg); 95 Rudolf Mejcskowski (Kl); 96. Hans Naderer (Kl); 97. Antonie Listner, Afritz (Gr. Villach); 98. fakinstr. Hans Jungschaffer, Ried i. I. (Gr. Linz); 99. Kellner, Otto, Wien (Zwach); 100. Wührer, Marie, Salzburg; 101. Paar, Fritz, prof.; 102. Salzmann, Dr. Aub. juna ĉiuj Wels; 103. Kaar, Gottlieb, Thalheim ĉe Wels (Wels); 104. Moser, Ernst; 105/6. Josef kaj Rosa Kie - ner; 107. Hubert Mallinger, fervojofic.; 108. Hermann Wiedenhofer; 109. Joh. Hager; 110. Paula Schubert; 111. Max Rembart, ĉiuj Wels; 112. Christians, Karl, Wien (Kl); 113. Mich. Santner, impostkontrolofic., Tamsweg (E.-gr. Salzburg); 114. Nik. Boda, justicsekr., Oberpullendorf (AEA); 115. K. Fiebinger. Wien (Kl); 116.-151. E-soc. por Stirio, grupo Graz (Listo sekvos), same sekvos listo de „Fideleco-Wien", Salzburg, Innsbruck ktp.

Graz. E.-Soc. p. Stirio. Reg. Rat Steiner berichtet vor Eingehen in die Tagesordnuug der Vollversammlung (24. Nov.) über die neuen Radiosendungen, das Programm für die Sendung am 13. Dez. (Zamenhof-Feier), die Intern. Konferenz 1934 in Wien und die Aussichten für einen Weltkongress 1935 in Salzburg oder Innsbruck. Im Tätigkeitsberichte wird besonders des Wirkens von Schulrat Schöpfer in Voitsberg und des Andenkens Frau Anna Bartels gedacht. Obmann Rogler erwähnt auch die Besuche von Reg. Rat Steiner (9. 12. 32 und 1. 10. 33) und Dr. Sirk-Laibach. Durch Transferierung fast aller Mitglieder musste die Leobener Ortsgrnppe liquidiert werden; Bücher, Schriften und Bargeld wurden übernommen. Der Kassenbericht zeigt gegen das Vorjahr günstigere Ziffern. Gewählt werden: Bartl, Bauer, Dr. Biehler, Calisto, Gindl (Leoben), Oberst Hackl, Lossos, Perneg (Eggenberg), Rogler, Ing. Schalko, Schulrat Schöpfer (Voitsberg) und Turk Die Beiträge werden in alter Höhe eingehoben und mit der AEA nach den neuen Sätzen verrechnet. Dadurch wird jedes Mitglied zugleich helpmembro der UEA. Bezieher des Jahrbuches und der Genfer Zeitung zahlen die in der Novemberfolge des AE genannten Beträge auf. Für die Gruppe, AEA und UEA wird eine einheitliche Mitgliedskarte geschaffen. Schulrat Schöpfer bittet um Förderung des Heroldo durch Bezug und Einsendung von Artikeln. Der Bezirksvorstehung Voitsberg (Herrn Kellner) wird hiemit für die Förderung der weststeirischen Esp.-Bewegung offiziell gedankt. **Dr. Biehler.**

Graz. Dir. Horneck gvidas en sia komerclernejo denove E-kursojn.

Gr. **Sieghartś:** Kurso finiĝis kun 20 pers. Nova kurso. En januaro nova kurso komencota. 40 grupmembroj. (Gratulon al s-ano Nowotny, kiu multe klopodas!).

Mattighofen. E.-laborkomitato aranĝis la 8. dec. kunvenon de interesuloj kun provleciono. Kurso komenciĝis la 29. nov. gvid. Ulbrich.

Neumarkt ĉe Salzburg E.-Kurso komencita de f-ino Russmayer la 8. dec.

Salzburg. Prof. dro Christanell gvidas 2 kursojn en la Universitato kaj Urba Komerca Lernejo.

Wien: E.-Grupo Danubio. 18. 12. Parolata E.-gazeto s-aninoj C. Flecker, Jos. Steiner; s-roj Cech, Hovorka, A. Klein, Mudrak, Vasta.

Wien. Reg. kons. Stengel denove gvidas E-kurson en la komerclernejo Schremmer.

Festkunveno de „Fideleco" okaze de l' 25. datreveno de ĝia fondo.

La 24. oktobro E.-societo „Fideleco" festis en sia kunveno, Wien, XVIII. Staudgasse 1 (kafejo Zoglmann) sian naskiĝfeston. La prezidanto kortega kons. d-ro Karlo Klečka malfermis la festkunvenon per kelkaj salutvortoj. Poste studkons. prof. Otto Simon vortprentris la historion de la fondo de „Fideleco" kaj honorige parolis pri la fondinto burĝlerneja dir. Adolf Macho. „Tiu ĉi eminenta esperantisto", diris la oratoro, „formis rondon de esp-istoj, el kiu devenis „Fideleco" kaj fondis Komitaton por ekzamenoj en E. Tiu ĉi Komitato estis komence de privata karaktero kaj estis destinita kiel preparo de posta ŝtata ekzamenkomisiono. Ĝi estis fakte ŝtatigita, kiam E. estis enkondukita en publikajn lernejojn kaj estiĝis bezono je ekzamenitaj instruistoj. Ankaŭ la enkonduko de E en publikajn lernejojn estis merito de Macho, kiu ekkonis, ke E povas neniam trovi bazon en la popolo por sia disvastiĝo kaj praktika uzado sen enkonduko en lernejojn. Por tiu celo oni bezonis spertajn fakinstruistojn, kiuj kapablus pruvi sian scion en E per ekzameno antaŭ aŭtoritata ekzamenkomisiono. Al lia nelacigebla laboro oni dankas, ke E estis enkondukata en lernejojn kiel nedeviga instrufako. Laŭ la intenco de Macho Fideleco devis kaj devos praktike uzi E-on en la konversacio kaj ĝiaj membroj devas enpenetri per tradukado de fremdlingvaj literaturverkoj en E-on en ĝian spiriton. Dir. Macho laboris ankaŭ en tiu rilato diligente, li tradukis multnombrajn germanajn poemojn E-en, gvidis plurajn E-kursojn, konversaciis en Fideleco E-lingve kaj instigis tiamaniere la Fidelec-anojn konversacii E-lingve. Pro tio Fideleco ĝuis bonan reputacion inter la Vienaj E-rondoj. Restu fidelaj al la spirito de via fondinto! Fideleco prosperu kaj **kresku!"**